
1999 6

# KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



[ Brazilo — Urugvajo ] **Maria Jose Passadore**

redakcie — 84-a universala kongreso — gramatiko kaj trafiko
filozofie — poezie — proze — fable — enigme — anekdotoj
korespondu!

# KOMENCANTO

**1999 numero 6/ refondita en 1997/ 8 numeroj jare**
**redaktas kaj eldonas**: Viktor Kudrjavcev
**konstanta kunlaboranto:** Rafija Jafasova
**adreso**:
620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando
**elektronika poŝto** : let@epost.uralpost.ru
**abontarifo** por 1999:
*internacia tarifo*:
24 nederlandaj guldenoj aŭ $12; *orienteŭropa kaj latinamerika tarifo*: $10; aŭ por ĉiuj — 15 IRK
**konto ĉe UEA**: vkud-a
*ruslanda tarifo kaj la rubla zono* . 54 рубля (за 8 номеров в год) простым почтовым переводом на имя Кудрявцева Виктора Васильевича: 620041, Екатеринбург, а. я. 132


# PERANTOJ de KOMENCANTO

*laŭ ĉi-subaj adresoj vi povas aboni nian gazeton*

AŬSTRALIO
Libroservo de AEA, P.O.Box 230 Matraville N.S.W 2036.
ĈEĤIO
Vladislav Hasala, A.Dvořáka 1, CZ-696 62 Strážnice
ESTONIO
Virve Emits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn
FRANCIO
Raoul G.Melo, 34, av de Russie, F-03700, Bellerive s/Allier
IRANO
Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN
ITALIO, KROATIO, SLOVENIO
Viŝnja Brankoviĉ, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste
KUBO
Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO
POLLANDO
Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskego 77-137, PL-01-865 Warszawa
SVEDIO
SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby
SVISLANDO
Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen
UKRAINIO
Dmitrij Cibulevskij, ab.skr. 9307, UA — 310003, Ĥarkiv

ĈINIO - vakas; BRITIO - vakas; JAPANIO - vakas; NEDERLANDO kaj ceteraj - vakas;

# redakcie

Karaj legantoj!

Mi feliĉas prezenti por via atento la 6-an kajeron de KOMENCANTO.

La kovrilpaĝo ĉi-foje estas iom netradicia kaj venis el Brazilo, el E-klubo de urbo CARAGUATATUBA , la aŭtoro estas *Maria Jose Passadore* el Urugvajo. La redakcio kuraĝas nomi la desegnaĵon "Per Esperanto al paco kaj amikeco"!

Sur la tria paĝo — la ĉefa evento de la esperantista jaro, la 84-a Universala Kongreso de UEA. Bedaŭrinde ni ne partoprenis ĉi-jare la Kongreson, sed havas pri ĝi detalajn informojn.

La temon GRAMATIKO kaj TRAFIKO ni daŭrigas per prezento de publikaj surteraj veturiloj, kies komuna trajto estas radoj. Sprita desegnaĵo de *Bill Thome* helpas nin.

Sur la kvina paĝo debutas du tute novaj por ni aŭtoroj. *Mauricio Monken Gomes* el Brazilo proponas lanĉi en KOMENCANTO filozofian temon kaj kontribuas per traduko el la libro "Vivo feliĉa". Eble niaj legantoj subtenos la proponon kaj ĝi trovos sian konstantan lokon en nia revuo, kial ne? *Jurij Perevalov* el urbo LESNOJ, Rusio, estas jam konata nomo, sed ĉi-foje li debutas per originalaj desegnaĵoj, kiuj trafe ornamas la tekstojn.

La dua debutanto estas *Makarova Marina* el urbo BERDSK, Rusio. Ŝian lirikan poemon ornamas desegnaĵo de nia jam konstanta pentristo *Snejana Kononova*, kiu preparis jam multajn belajn etudojn por KOMENCANTO kaj vi povos ĝui ilin fakte en ĉiu el venontaj numeroj.

*Nina Vinnikova* el NOVOALTAJSK, Rusio, aperas en "K" jam la trian fojon sinsekve kun siaj desegnaĵoj, sed ĉi-foje debutas kiel aŭtoro de la rakonteto "Somera tago", kiun certe, ornamis mem. *Maksim Petrov* el Kazahio, urbo AKSU, tradukis du spritajn fablojn, fakte ili koincidas kun la "FILOZOFIO" de *M.Monken Gomes*, ĉu ne?

Sur la sepa paĝo estas tradiciaj anekdotoj kaj *ne*tradicia enigmo, denove el Latina Ameriko. Debutas nia nova aŭtoro *Yonier Cables Solis* el urbo HOLGVINO, Kubo.

Por via plezuro - 20 adresoj el 12 landoj de la mondo.

Ni ĝojas komuniki al vi, ke ni ricevis konfirmon por perado de nia revuo el Litovio, Brazilo kaj Argentino. Nia miskompreno kun ELNA jam for kaj usonaj esperantistoj povas nun aboni "K"-n pere de sia landa organizo.

La nova listo de perantoj kaj la abonkondiĉoj por 2000 jaro vin atendas en la 7-a kajero, kiu promesas esti nekutima kaj eĉ surpriza por vi.

**Restu kun ni, karaj niaj!**

redakto-fino de "K"-7'99 la 15-a de oktobro

# 84-a UNIVERSALA KONGRESO

## HISTORIE

La plej grava kaj multenombra ĉiujara renkontiĝo de esperantistoj en la mondo estas Universala Kongreso de Esperanto, kiun organizas UEA — Universala Esperanto-Asocio. Ekde la unua kongreso jam okazis 84 UK-oj. Nur la unua kaj la dua mondmilitoj ne permesis okazigi la kongresojn seninterrompe.

La Unua Kongreso de Esperanto okazis en aŭgusto de 1905 en franca urbo *Boulogne sur Mer*. Ĝin organizis kelkaj grupoj kaj kluboj esperantistaj. Partoprenis 688 partoprenantoj kaj la majstro Ludoviko Zamenhof mem. La sukceso estis grandioza. (Tiam la Kongresoj ne havis nomon *Universalaj*)

En aprilo de 1908 estis fondita UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO — UEA, kiu ekde tiam prenis en siajn manojn organizadon de la Universalaj Kongresoj. Plejparte la kongresoj okazis en eŭropaj landoj, sed estis ankaŭ en Usono trifoje, en Brazilo, Japanio, Islando, Suda Koreio, Kanado, Aŭstralio. La plej multenombra kongreso okazis en 1987 - la jaro de 100-jariĝo de la Internacia lingvo - en Pollando, en Varsovio kun 5946 aliĝintoj!

## En BERLINO

Ĉi-jare la vica 84-a Universala Kongreso okazis 31 jul - 7 aŭg en Berlino. Ĝi estis jam la oka UK, okazinta en Germanio, sed por la unua fojo en Berlino. La kongresa temo "Tutmondiĝo - ŝanco por paco?"

Oficiale aliĝis por la kongreso 2710 personoj el 65 landoj. (Iom malplimulte ol pasintjare en Montpeliero, Francio-1998. Tiam aliĝis 3095 esperantistoj el 71 landoj). Laŭlande: Germanio 498, Pollando 300, Francio 294, Japanio 221, Nederlando 103, Svedio 101, Britio 72 kaj Ruslando 71.

La kongresa programo estis tradicia. Tiu tradicio rezultiĝis dum jardekoj kaj inkluzivas:

Registrado kaj disdonado de la kongresaj dokumentoj, inter kiuj estas Kongresa Libro kun detala laŭhora programo kaj familinomoj kaj adresoj de ĉiuj aliĝintoj. Solena malfermo, pluraj fakaj kunvenoj, ekzemple: instruistoj, skoltoj, fervojistoj, vegetaranoj, sciencistoj, artistoj, poŝtistoj, Oomoto, medicinistoj, nefumantoj, blinduloj, verkistoj, radio-aŭskultantoj, sennaciistoj, kristanoj kaj multaj aliaj flankoj de la esperantista agado; kunsidoj de la Komitato de UEA, kursoj, ekzamenoj, bankedo, kongresa balo, koncertoj de muzikistoj, kantistoj, teatraĵetoj, internacia arta vespero, solena fermo.

## EKSKURSOJ

aparte nin interesas, ĉar nia ĉefa temo por tiu ĉi jaro estas Esperanto kaj Turismo. Kaj la Universalaj Kongresoj estas unu el la plej gravaj eventoj por realigo de turismaj emoj lige de Esperanto. Okazantaj ĉiam en aliaj landoj ili permesas al la adeptoj de la internacia lingvo vojaĝi.

Ĝuste tial la organizantoj ĉiam preparas riĉan ekskursan programon. La ekskursoj estas mendataj kaj elaĉetataj eĉ antaŭ la Kongreso. Tiel okazis en Montpeliero. En Berlino antaŭmendoj okazis malmultaj, sed surloke oni tiom aktive elaĉetis la ekskursojn, ke la nombro atingis rezultojn de la pasintjara Montpeliera kongreso, multe pli amasa!

La ekskursa parto de UK-oj efektive estas nemalpligrava ol la laborkunvenoj, ĉar la plejmulto venas al UK ne por labori sed por bone ripozi! En Berlino la plej popularaj ekskursoj estis al Reichstag, Egipta Muzeo, Branderburga Pordego, Kurfurstendam, Kastelo de Charlottenburg kaj Erotika Muzeo, Potsdamo kaj Dresdeno. Multaj kongresanoj vojaĝis kaj ekskursis individue ankaŭ preter organizitaj grupoj.

La 85-a UK okazos sekvontjare en Tel-Avivo (Israelo) kun la ĉeftemo "Lingvo kaj kulturo de Paco". Poste nin invitas Zagrebo (Kroatio, 2001,) kaj Fortalezo (Brazilo, 2002). Respektive Azio, Eŭropo kaj Ameriko.

(Se vi deziras partopreni UK-85 en Tel-Avivo petu la detalajn informojn ĉe la redakcio de "K")

# GRAMATIKO kaj TRAFIKO

Ni daŭrigas la temon pri TRAFIKO lige al nia ĉefa temo "Esperanto kaj vojaĝoj" aŭ "Esperanto kaj turismo".

En la antaŭa kaj en ĉi-numeroj ni priskribas surterajn trafik-rimedojn, kies komuna trajto estas *radoj*.

Pasint-foje ni rakontis pri la individuaj veturiloj, ĉi-foje pri la komunaj. Tio estas aŭtobusoj, (trolebusoj), tramoj kaj trajnoj.

**aŭtobuso** — (inter)urba publika veturilo. Moviĝas per benzina motoro laŭ ŝoseo. Ĝin stiras ŝoforo.

**trolebuso** — la samo kun elektra motoro, veturas laŭ elektraj dratoj.

**tramo** — iam ĉevala, nun elektra veturilo por urbaj pasaĝeroj


**trajno** — aro da vagonoj, sekvantaj unu la alian, kunkroĉitaj kaj movataj de lokomotivo, irantaj laŭ difinita horaro. Veturas laŭ fervojo, kio estas feraj reloj, fiksitaj al ŝtipoj


**metroo** — elektra fervojo, subtera aŭ supertera, kiu komunikigas la diversajn kvartalojn de granda urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo

**kondukisto** — tiu, kiu metie kondukas veturilon

**vagono** — surrela veturilo por pasaĝeroj aŭ varoj

**konduktoro** — oficisto, kiu akompanas publikan veturilon ne kondukante ĝin sed plenumante difinitajn devojn por pasaĝeroj, kontrolas biletojn.




😐 - **Mi superruzis la konduktoron!**


☹ - **Kiel?**


☺ - **La bileton mi aĉetis sed ne veturis!**

Ĉu mi ŝokiĝos se mi tretus sur la relon?

Ne sinjorino, krom se vi metus la alian piedon sur la supran kablon!

**Bill Thorne**, [LONDONO, Britio]




trajno

**Mauricio Monken Gomes**, [CARAGUATATUBA, Brazilo]

*"Se mi estus redaktoro — vi petas sugestojn, ĉu ne? — mi inaŭgurus eron "FILOZOFIO"*

Jen kontribuo:

# La plej bona leciono

"La plej bona leciono de la vivo estas la amo.

Sen ĝi atingotaj celoj perdas la motivon, lasante la homon sub la kaprico de la malnoblaj pasioj.

La amo solvas la ombrojn de la negativaj sentoj, premsignante la sigelon de mildeco en ĉiuj agoj.

Do, amu ĉion kaj ĉiujn.

Praktiku la amon al la Naturo, kiu belas en la suno, aero, akvo, arboj, floroj, fruktoj, bestoj, kaj homoj.

Lasu vin kortuŝi per la silentaj invitoj faritaj de nia Patro, la Kreanto, kaj disdonu viajn emociojn super ĉiuj aferoj, interne mildigante vin.

Ju pli vi amos, des malpli vi estos atingitaj de la malbonpikilo, ĉar via larĝa kompreno malfermos spacojn al la vivo, rikoltante nur la efikojn de la paco"

[el la libro VIVO FELIĈA, *Joanna de Angelis* (*Divaldo Pereira Franco*) Esperantigis *Osvaldo Pires de Holànda*]



**Jurij Perevalov** [LESNOJ, Rusio]



# L'aŭtuna vespero

Venas l'aŭtuna vespero.
Mallumas la hela ĉielo.
Bruas malĝoje l'acero.
Brulas la lasta kandelo.
Kaŝiĝas la ruĝa suno,
Kaj finiĝas la somera tago.
Baldaŭ aperos la luno,
El post la mallaŭta lago.
Kaj la akvo similas al oro
Tio estas la nuanco de la suna falo.
Fermiĝas la floroj
Kaj ekdormas la flora valo.
Kantas la noktaj griloj
Kaj aŭdiĝas la nokta parolo.
Malaperas la suna brilo.
Mallumiĝas la ĉiela tolo.
Baldaŭ brulos la steloj.
Blovas la frida vento.
Brulas la lasta kandelo.
Kia tre stranga aŭtuna sento!
El la ĉielo malaperas la nuboj —
Morgaŭ estos la bona vetero.
Venas la tempo de la duboj —
Venas l'aŭtuna vespero.

**Makarova Marina**
[BERDSK, Novosibirskaja obl., Rusio]
desegnaĵo de **Snejana Kononova**
[Niĵnjaja OMKA, Rusio]



**Nina Vinnikova**,
[NOVOALTAJSK, Rusio]

# SOMERA TAGO

En unu tre varmega julia tago, kiam eĉ arboj, plenigitaj de suna lumo ne susuris kaj birdoj trankviliĝis, okazis komika historio.

En malgranda, sed tre brua vilaĝeto ne estis konstanta paŝtisto. Kaj ĉiu familio paŝtis brutaron de bovinoj alterne.

En unu familio estis tri fratinoj, kiuj estis gajaj kaj amis ŝerci.

Kiam venis ilia vico paŝti, ili kun najbara knabino la tutan matenon gis la tagmezo konscience paŝtis la brutaron.

Inter brutaro ankaŭ estis kapro, nomita Klaŝka.

La knabinoj por rido vestis la kapron en pluvmantelon, gumajn botojn kaj aldone kaskedon.

En tiu ĉi ornamvesto la kapro iris en la mezon de la brutaro.

La bovinoj ektimis, saltadis diversflanken kaj la knabinoj falis pro la rido.

*Andrej Kniŝev* El "La urbaj fabloj"
Esperantigis **Maksim Petrov**
[AKSU, Kazaĥio]

# FIRMA POZICIO

— Vi ne havas propran vizaĝon. Rigardu al vi: ankoraŭ hieraŭ sur vi estis verdaj folioj, hodiaŭ — la flavaj, morgaŭ eble vi okazos tute nuda? Vi havas foje floretojn, foje beretojn. Kia senprincipeco! Kia amorfa vivpozicio! Vi ŝanĝas koloron, fleksiĝas sub la cirkonstancoj kaj dancas je la fremda fluto! Necesas ne balanciĝi inter ekstremoj, sed ĉiam resti tia, kia vi estas!

Tion diris la arbostumpo al la pomarbo.


# DISKUTO

Ĉe la granda ronda tablo en granda trafumita ĉambro sidis gravaj homoj. Multe da homoj. Ili diskutis.

Oni diskutadis ĥore, pere kaj unuope. Oni kriis, batis sin en bruston kaj piedfrapis. Ili akuŝadis VERON.

Naskiĝis VERO. Iomete sidis, iomete aŭskultis. Ekspiris kaj foriris...

Sed la homoj samtiel diskutadis.



**Jurij Perevalov**, [LESNOJ, Rusio]




**Margarita Zujeva**
[MOSKVO, Rusio]

Unu sinjorino demonstras al sia amikino novan veston
— Ho, - miregas tiu,- tio ĉi estas la plej lasta krio de modo!
— Ne tute, - ridas la unua, - Okazos la lasta krio de mia edzo, kiam li ekscios la prezon!

* * *

Ŝi atente pririgardas lin kaj demandas:
— Kiel vi sinsentas en novaj okulvitroj?
— Belege! - ridetas li. - Mi nun renkontas homojn, kiujn ne vidis dum kelkaj jaroj!

* * *

Li akompanis ŝin ĝis la pordo de ŝia domo kaj tie kisis.
— Ho,...- flustris ŝi, - Oni povas ekvidi nin!
— Ne timu, - trankviligas li. — En tiu distrikto min ankoraŭ neniu konas.

* * *

Komencanta legomĝardenistino aĉetas semojn kaj demande rigardas al la pakaĵo kun la semoj, ĵus aĉetitan.
— Ĉu vi volas ion demandi? - adresas al ŝi la vendistino.
— Ĉu mi devas semi ilin po-pare?

**Natali Jefimova,**
[USTJ-KATAV, Ĉelabinskaja obl., Rusio]

Kolera, malica patro insultas la filon:
— Pensu nur, kiom kostas via lernado en la lernejo!
— Sed, patro, - respondas la filo, - mi ja lernas tie malpli ol ĉiuj aliaj!

**Viktor Alikin**, [PERMO, Rusio]
Duopo kaptas fiŝojn. Unu el la fiŝistoj parolas:
— Bonvolu diri, ĉu vi havas rezervan flosileton?
— Por kio?
— Al mi oni vendis difektitan flosileton, ĝi la tutan tempon dronas!

ж ж ж

Sur la bordo de rivero staras tendo. Viro, kuŝante en ĝi, kaptas fiŝojn.
— Kiu do kuŝante kaptas fiŝojn? - demandas lin alirinta fiŝisto.
— La doktoro rekomendis al mi "kuŝantan reĝimon", - respondas fiŝisto el la tendo.

ж ж ж

**Valerij Nikolajeviĉ Habarov**
[GORJAĈIJ KLUĈ, Krasnodarskij kr., Rusio]


* * *

Averto: "Estu singardaj! Tie ĉi estas stupe-pe-pe-pe-pe-pe-pe-pe-pe-pe-pe-pe-toj!"

* * *

**Yonier Cables Solis,**
[HOLGVINO, Kubo]

TROVU KVIN DIFERENCOJN



# KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 5 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de "KOMENCANTO" - senpage

*Stanislaw Fisher*
48 ja., interŝanĝo de poŝtmarkoj k uzitaj telefonkartoj
ul. Bulgarska 8/8,
PL-64-100
LESZNO
POLLANDO

*Irina Sabirova*
36ja., ŝatas legi librojn, kudri; volas korespondi tutmonde
Parkovij, 4-8
KIZILSKOE
457610
Chelabinskaja obl
RUSIO

*Declerck Pauline,*
14 ja., lernantino, deziras korespondi tutmonde
1754 Chemin du Byssaert,
FR-59380
GUAEDYPRE,
FRANCIO

*Viktoria Litvinova*
23ja., fortepiano-instruisto, korespondi tutmonde
Lazo 102, BIKIN,
Ĥabarovskij kraj
682980
RUSIO

*Bernard Legeay*
44ja., kor. por praktiki Es-on kaj interŝanĝi vizitojn
Isanchou le Haut
F-12690,
AGEN D'AVEYRON
FRANCIO

*Carlos Alberto Ferreira Silva* kun la edzino *Jeanete*
korespondi kaj interŝanĝi vizitojn kun esperanto-familioj
Caixa Postal 01-0179,
BR-235-1768
VITORIA ES
BRAZILO

s-ro *Gerard Marschall*
interŝanĝas francajn poŝtmarkojn, bildkartojn, monerojn kontraŭ vialandaj poŝtmarkoj
99, rue des Frois-Chateaux
FR-68000
COLMAR
FRANCIO

s-ro *Javier Gomes*
korespondi kun vi! Vere!
CRA 84 B
No 45-36 SUR Bloque
P. Apto 211,
BOGOTA,
KOLUMBIO

s-ino *Bozena Kijo*
korespondi kun komencantoj pri diversaj temoj, ekzemple natura medicino
ul. Okrzei 4/12 m. 52, PL-91-075
LODZ
POLLANDO

f-ino *Marta Fredrych*
muziko, turismo, libroj, kantoj
ul. Florianska 16/20,
PL-44-217
RYBNIK
POLLANDO

s-ino *Maike Bouma*
33ja., turismo, ebleco de reciprokaj gastigadoj
Diepenbrockstrjitte 57,
NL-8916
EH LJOUWERT/
LEEUWARDEN
NEDERLANDO

f-ino *Gina Fereira*
amika korespondado pri lingvoj, muziko kaj sporto
Ave Sao Miguel
Nascente 2,3,D,
PT-2800, ALMADA,
PORTUGALIO

s-ino*Galina Starostina*
56 ja., ŝatas pentri kaj desegni,legi sciencpopularajn librojn, mediti pri vivo, revi, fantazii, korespondi tutmonde
Makeeva, 28-4, MIASS,
Ĉelabinskaja obl., 456320
RUSIO

s-ino *Esther Acevedo de Ramirez,*
54ja., turisma gvidistino, kutimoj kaj tradicioj de diversaj landoj
Grimaldo del Solar 159,
Miraflores,
LIMA
PERUO

s-ro *Ludovit Jurko*
fremdaj lingvoj, humuro
Svermova 7,
SK-04001
KOSICE
SLOVAKIO

s-ro *Jasangav*
Mongola turisma kompanio akceptas Esperanto-turistojn
P.O. 21/797
ULAN BATOR
MONGOLIO

s-ro *Navid Saminasab*
26ja., Koresponde interrilati kun kvin kontinentoj
Ollerdveien 4,
NO-1930
AURSKOG
NORVEGIO

s-ro *Thor Granum,*
pri automobiloj, motorcikloj kaj motoroj
Regnbueveien 11,
NO-0664
OSLO
NORVEGIO

s-ro *Jeanis Wilson*
korespondi kun gejunuloj kaj esperanto-instruistoj
37 Peakes Rd.,
WANGANUI
NOV-ZELANDO

s-ro *Vladimir Starostin*
26 ja., komencanto, foto, pm., lingvoj, literaturo, fiŝkaptado, ŝako, vojaĝoj. Eŭropo kaj Nordameriko. Nepre respondos!
Makeeva, 28-7, MIASS
Ĉelabinskaja obl., 456320
RUSIO

**INTERNACIA KORESPONDA E-KLUBO**

serĉas novajn geamikojn tutmonde. Ĉe nia klubo oni eldonas la gazeton, kiu disvastiĝas inter abonantoj-klubanoj. Se vi deziras aliĝi al la klubo kontaktu:
Morgun Timur, ab.k. 279, LIPECK, RU-398050, RUSIO

